

surdaj nomoj, per laŭsistemaj dividadoj de la specioj en subgrupojn de sinsekva kategorio (kiuj necesigis tri-, kvar-, eĉ kvinvojtajn nomojn), ktp. El tiuj komplikoj eĉ sekvis la neceso aldoni la nomon de la priskribinto (sen aŭ kun krampoj), eĉ de la priskribjaro, por garantiĝi certecon; kaj tio necesigis uzi specialajn litertipojn en la publikaĵoj sciencaj.

Sekve en tiu bone elpensita »Linné-a« sistemo multaj nomoj nuntempe kaŭzas sencon de nekomprenobleco. Plie ili forpuŝas la amatoron. Krome ili okazigas evitindan tempoperdon en la verkado de biologiaj studoj. Tre ofte la verkanto estas devigata konsulti plurajn librojn, ĉar li dubas pri la ĝusta skribmaniero, aŭ ĉar li deziras pro akurateco aldoni la nomon de la priskribinto kaj la jaron, — terminoj, kiujn li ĝenerale ne konas parkere.

Multaj sciencistoj jam delonge deziras ke la biologio eskapu el tiu konfuziga stato. Sed la proponitaj rimedoj, anstataŭ solvi, plikomplikigis la problemon. La komisionoj, kiujn oni starigis por decidi pri la adoptendaj reguloj de la nomenklaturado, ne sukcesas forigi la nelogikaĵojn, kiuj laŭ la regantaj konceptoj estas konservendaj pro tradiciaj (kaj tute ne sciencaj) kaŭzoj. Pro tiuj cirkonstancoj la scienco baraktas en nomenklaturado, kiun oni preskaŭ ne rajtas rearanĝi. Ŝajnas al mi ke ekzistas nur unu taŭga solvo, kiu tamen estas sufiĉe drasta: la anstataŭigo per nova nomenklaturado, kiu enunua periodo estu uzata paralele al la latindevena, kaj kiu iom post iom anstataŭos ĝin komplete.

Ekaperas tamen la problemo, kiun lingvon oni uzus por tiu anstataŭa nomenklaturado. Laŭ mi la lingvo Esperanto havas plurajn avantaĝojn, kiuj taŭgigas ĝin por tiu celo. ekz. ĝia logikeco, ĝia internacieco, ĝia simileco al la latina lingvo, ĝia aglutineco, la fakto ke ĝi estas nova lingvo en plena evoluo, la fervoro, entuziasmo kaj renovigemeco de ĝiaj adeptoj, la gramatika senescepta distingo inter substantivoj kaj adjektivoj.

Jam pli ol unu biologo cerbumis pri la eblecoj lanĉi esperantlingvan nomenklaturon, kaj jam en 1908 aperis broŝureto pri tiuj ideoj. En la lastaj jaroj kelkaj aplikaĵoj de esperantlingva scienca nomenklaturado aperis en kelkaj sciencaj traktaĵoj. Mi citu tiujn de C. Stop-Bowitz kaj de W. de Smet (la subskribanto). Estas tamen esenca diferenco inter la projektoj de tiuj du verkintoj. Unuflanke Stop-Bowitz emas transformi la jam ekzistantan latindevenan nomenklaturon en esperantlingvan. Aliflanke De Smet proponas kapti la okazon de la transformado por enkonduki tute novan, pli logikan kaj pli centrafan, nomeklaturon. Necesas esplori kiu sistemo estas preferinda kaj aplikinda en la scienco.

La sistemo, kiun Stop-Bowitz proponas estis klarigata en la ĵus farita prelego (vidu pliajn detalojn en la koncerna artikolo antaŭ ĉi tin). La sistemo, kiun De Smet proponas, estis jam aplikita de li en la artikolo »La Polipteroj, strangaj afrikaj fiŝoj« (SR, 41a, 1959). Tie estas pritraktataj la dekkvin specioj de la fiŝfamilio Polypteridae.

**Rilate la sistemoj** oni ankaŭ ne neglektu priatenti jenajn faktojn:

1. Eble ekzistas aliaj sistemoj en la menso aŭ en la skribaĵoj de aliaj sciencistoj, kaj tiuj nepre meritas nian atenton.
2. La sciencistaro ĝenerale estas tre konservema, kaj malgraŭ la evidenteco de la malfacilaĵoj, ĝi ne facile forlasos la tradician sistemon por transiri al alia, preskaŭ revolucia, projekto.
3. Tiuj sistemoj celas utili por sciencaj studoj. Ili ne ekskludas ke por la bone konataj animaloj kaj plantoj ekzistu vulgaraĵnomoj en Esperanto (kiuj cetere jam multaj ekzistas).
4. Novaj sistemoj devus ankaŭ abligi adaptajn dividojn por rasaj grupoj (ekz. por la prahomaj grupoj) kaj por genetikaj grupoj.
5. Ĉiu sistemo neeviteble estas la produkto de la tiutempaj konceptoj pri sitsematiko. Ĝuste pro tio oni ne devas atribui eternan valoron al iu ajn sistemo aŭ sistemprovo, sed nur konsideri ĝin tiutempa metodo por nomi la organismojn, kiu devas esti adaptata al la cirkonstancoj en la scienco mem kaj en la sciencistaro.

62 (100) + 408.92 : 0018

## VALORO DE ESPERANTO POR INTERNACIA EVOLUO DE MEDICINO

de Prof. D-ro Hideo Yagi

### Lingva ŝarĝo al medicinistoj

En Japanujo oni uzis la ĉinan lingvon en medicinaj aferoj ĝuste same kiel la latinan en Eŭropo. Medicina artikolo, tezo, percepto, protokolo k. a., ĉio estis skribita en la ĉina ĝis la lasta jarcento. Niaj antaŭuloj studis do la ĉinan lingvon fervore antaŭ ol komenci propran studon de la medicino. Tiu tasko postulis grandan energion. La nombro de ĉinaj ideografiaj literoj kalkuliĝis pli ol 10,000 por uzo de medicinistoj. Post enkonduko de la okcidentaj medicinoj, t. e. nederlanda, germana kaj usona, la japano komencis transiri al nova alfabeto skribado, forĵetante la ĉinan; nome alprenis alfabeton kaj uzis aŭropajn lingvojn anstataŭ la ĉina. Nun ni skribas artikolojn en la japana lingvo kun terminoj japanaj (ĉin-literaj) kaj latinaj miksite. Ŝarĝo al la japana popolo estas ankoraŭ granda. Krome, la latina terminaro prezentas al ni malfacilajn gramatikojn. Ĉar la japana lingvo ne posedas kazon de substantivo, nek sekson, nek nombron, estas al ni tre malfacile kompreni kial »arteria femoralis« kaj »os femorale«, »arteriae femorales« kaj »osa femoralia« ktp. Al ni naturaj lingvoj estas same malfacilaj ĉu angla aŭ germana ĉu rusa aŭ hispana. Ni devus perdi preskaŭ la tutan vivon en lernado de lingvoj kaj nenion en medicino mem!

Facila helplingvo kiel Esperanto estas akre dezirata de ni Orientanoj pli multe ol Okcidentanoj. Solvo de lingvo aŭ alpreno de unu komuna lingvo internacia estas urĝe necesa por medicinistoj tutmondaj!

### Esperanto kaj Medicino

Teorie unu komuna lingvo kiel Esperanto estas sendube utila por medicino. Sed, kia estis kaj estas la fakto? Mi citos aferojn pri evoluo de Esperanto en Japanujo. Laŭ la »Bibliografio de Medicina Literaturo aperanta en Japanujo« eldonita en 1956 de la Japana Esperanto-Instituto, Tokio, ni jam havis 1.010 esperantajn skribaĵojn en medicino, kiuj konsistis el 147 Esp. originaloj, 296 Esp. resumoj, 22 terminaroj kaj 545 ne-aŭtoraj resumoj. En 1955 Prof. D-ro S. Nishi eldonis grandan jubilean verkon de anatomiaj artikoloj kaj en 1961 libron esperantan »Nia korpo, anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj«. Prof. D-ro Seiči Kato eldonis en 1959 Esperantan »Lernolibron de Oftalmologio«, kiu estas bona teksto por studentoj medicinaj. Estas klare, ke tiuj ĉi tri estas pruvo de japana kontribuo al Esperanto en medicino. Mi volas aldone diri, ke Esperanto estas facila lingvo ne nur al la japano, sed ankaŭ al ĉiuj aziaj popoloj. Esperanto helpis al ni por diskonigi niajn laborojn al eksterlando. Ĝi montris al ni facilecon en skribadounuflanke kaj montris ankaŭ aliflanke al ni valoron kiel bona internacia komunikilo. Esperanto estas pli bonveniginda por la japano ol aliaj naturaj lingvoj pro ĝia facileco kaj logikeco. Ni taksas Esperanton alte kaj volas vidi la Internacian Lingvon en medicina rondo en la estonteco, kiu progresigos medicinon de diversaj nacioj, kiu kontribuos al kontaktiĝo de samprofesianoj de diversaj nacioj en la mondo, kaj kiu unuigos medicinon, kiu estas posedaĵo efektive de la tuta homaro!

### Esperanto en Eŭropo

Mi ne devas forgesi citi ĉe tie la meriton de multaj medicinistoj kaj medicinaj ĵurnaloj de la tuta mondo, precipe de Eŭropo, kiuj sin okupis pri alpreno de Esperanto en siaj originalaj kaj resumaj skribaĵoj. Interalie mi volas nomi »Journal de Medicine de Lyon«, kiu daŭre uzadis nian lingvon kaj en 1961 eldonis luksan jubilean kajeron de la 1.000-a numero, kiu havis multe da esperantaj resumoj. En Eŭropo kaj Usono, la principo de helpa lingvo estas tute sama kiel en Azio. Sendube unu internacia lingvo, neŭtrale homa, devas esti alprenita kiel oficiala lingvo en frua estonteco — por evoluigi la medicinon.

### Tasko de Esperantistoj-Medicinistoj

Por montri praktikecon de Esperanto ni devas skribi ĉiam denove originalojn kaj resumojn en Esperanto. Kaj, samtempe ni volas havi modernan vortaron medicinan. La »Esperanta Teknika Medicina Vortaro«, verkita de D-ro Briquet, 1932, servis longe al ni. Sed oni nun bezonas renovigitan eldonon, kiu enhavos multe da pli novepokaj terminoj. La dua tasko estas plifortigi medicinan fakkunvenon de la

Universala Esperanto-Kongreso kaj subteni plimulte la »Medicinan Revuon« eldonitan de Prof. Suzuki en Japanujo. La lasta tasko estos alpreno de Esperanto kiel unu oficiala lingvo en internaciaj kongresoj kuracistaj. Oni bezonos multe da tempo! Ni marŝu kun kredo paŝo post paŝo kaj realigu unu celon post alia kun senlaca laboro. La estonteco estos nia!

40:611 (100)

## LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ INTERNACIA DIVERSECO EN LA ANATOMIA PRISKRIBO

de Prof. D-ro Pablo Santamaría—Arnaiz

Post plurfojaj provoj la anatomiistoj 1955 fine sukcesis konsenti pri internacia nomenklaturado valida oficiale kaj ĝenerale.

La »nomina anatomica« publikigitaj okaze de la kongreso de Parizo kaj akceptitaj en ĉiuj landoj nomas preskaŭ ĉiujn detalojn de la homa korpo pere de substantivoj kaj adjektivoj elprenitaj precipe el la lingvo latina, tre malofte el la greka aŭ la araba. Ĉu oni povas sekve konsideri kiel solvitajn la problemon de la anatomia lingvo koncerne al internacia interkompreniĝado? Tute ne!

Hodinaŭ mi volas provi pritrakti la grandnombrajn nesolvitajn problemojn kiuj supermezure malfaciligas la legadon kaj eĉ pli la tradukadon de anatomi-sciencaj laboraĵoj kaj lernolibroj.

Estas kompreneble, ke anatomia priskribo estus tro ofte ŝarĝita de fremdvortoj, se oni uzus ĉiam la internacian nomenklaturon de Parizo. Sekvas, ke la sciencaj laboraĵoj kaj lernolibroj laŭeble evitas la latinajn nomojn, se la propra nacilingvo havas vorton konforman.

Facile oni povas konstati, ke ekzemple la nomoj **Lingua, Cor, Pulmo, Medulla spinalis, Ren** preskaŭ neniam estas uzataj. Tiu tradukebleco de la nomoj latinaj estas observebla plej klare en la lingvoj romanaj kies parenceco al la latina estas tre intima.

Pro tio estas kompreneble, ke la lingvoj romanaj rezistas plej al la uzado de la nomenklaturado latina.

El mia propra sperto mi povas rakonti, ke baldaŭe post la oficialigo de la internacia nomenklaturado de Parizo mi faris sciencajn laboraĵojn kaj sendis ĝin al revuo por publikigo. Mi estis skribinta la laboraĵojn france, sed zorgeme transpreninta ĉiujn anatomiajn nomojn el la internacia nomenklaturado. La eldonisto de la revuo tradukis ĉiujn nomojn latinajn en la francan lingvon, tiel ke la laboraĵo publikita ĉavas tute neniujn nomojn latinajn. Mi mencias, ke la revuo estas eldonata en Basel, kie en la jaro 1895 oni faris la unuan provon por fiksi internacian anatomian nomenklaturon. La revuo ankaŭ publikigas laboraĵojn en germana lingvo, kiuj memkompreneble enhavas nomojn latinajn.

Tamen nu nur la lingva beleco de la priskribo de la organismo suferas pro la enkonduko de fremdvortoj, sed ankaŭ en grandnombraj